

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 151^b
7. 8. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanoni (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonto
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona
ata al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Tria Laborkunsido.

Hodiaŭ precize je la 9 h. la Prezidanto D-ro Dietterle malfermas la kunsidon.
D-ro Spielmann raportas pri llo kaj prezentas rezolucion (vidu specialan raporton en hodiaŭa numero), kiu estas akceptata post diskuto.



S-o Wm. Drummond, Melbourne
Oficiala Reprezentanto de la Esperantistoj en Aŭstralio.

Daurigante diskuton pri UEA, s-o Stettler klarigas kiamaniere UEA intencas efektiviĝi la decidojn de la Konferenco de Venezia, dirante, ke UEA ne povas administri, sed nur helpi la komercon, elektante komercajn delegitojn.

Parolas pri la sama temo s-oj direktoro Glück, D-ro Fischer kaj Schamafek, dirante ke preferi oni elektu bonajn komercistojn, estantaj mezbonaj Esperantistoj, ol male. Partoprenas la diskuton s-o Stettler, D-ro Halbedl, k. a.

La Prezidanto legas alvenintajn telegramojn, i. a. de s-ino Hankel.

S-o Warden raportas pri Konstanta Kongresa Komitato, petante ke oni ne tro plendu pri iaj maloportunaj por la arango de la XV-a. Scigas ke venis invitoj por la XVI-a el Belgujo (de Unuigo de Int. Asocioj), Wien, Sofia kaj por la XVII-a el Italujo. — Raporto akceptata.

D-ro Privat klarigas la novan organizon de la Esperantistaro.

S-o Fischer parolas pri la financoj. C. K. ricevas monon de UEA kaj KR. Por ke la organizo ekzistu, ĉiu membro de ĉiu Esp. asocio devus pagi minimuman jarkotizon de 0.50 sviss. fk.

D-ro Privat scigas ke KR elektis Ĝeneralon Sebert honora prezidanto.

S-o v. Frenckell deziras, ke oni ne altrudu al ni novajn aŭtoritatojn kaj proponas ke CK havu la rajton elekti aŭ nomigi specialan komisionon konsistantan el prezidantoj kaj anoj de LKK de antaŭaj kongresoj por utiligi iliajn spertojn. — Akceptata post diskuto, kiun partoprenas s-oj Privat kaj Eroŝenko (el Pekin).

Laŭ propono de s-o Applebaum estas akceptata jena rezolucio:

„La XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg aŭdis la raporton de la Organiza Komisiono pri la progreso farita rilate al la starigo de Monumento al D-ro Zamenhof. Kongreso aprobas la raporton kaj direktas sian peton al la tutmonda Esperantistaro pri daŭra subteno en la monokolekto pro tiu celo.“

Estas preparolataj ankoraŭ diversaj aferoj, ekz. pri Varborso, pri „Esp. Ligilo“ ktp.

Je 12.15 h. la Prezidanto fermas la kunsidon.

Ovacio por Albrecht Dürer.

Dimanĉon okazis granda ovacio antaŭ la monumento de Albrecht Dürer, eminenta reprezentanto de fama skolo artistita de la Mezepoko. En la nomo de la gekongresanaro la L. K. K. metis florkronon je la monumento kun la surskribo „La tutmonda Esperantistaro al granda germana majstro.“ Paroladis s-ro Page-Edinburgh pri la internacieco de la arto kaj ĝia koincido al la Esp. movado.

Poste sekvis parolado de s-ro. Dr. Kalocsay, kiun ni represas ĉi tie.

Parolado de D-ro Kalocsay antaŭ la monumento de Dürer.

Samideanoj! Ni staras antaŭ la monumento de la plej granda filo de Nürnberg. Tra kvar centjaroj ni devas flugigi niajn pensojn por imagi al ni la epokon, en kiu li vivis kaj kreis: Nürnberg vidis tiam la tempon de paca kulturo inter siaj muroj, la tempon de floranta industrio, svarmo de metiistoj laboris ĉi tie diligente, precize kaj akurate, ankaŭ la famo de la Nürnbergaj ludiloj estis jam disvastiĝanta en tuta Eŭropo. Inter ĉi tiuj metiistoj elkreskis subite viro, laŭ sia propra diro ankaŭ mem metiisto, sed kies metia labora estis arto la plej alta. El lia ĉirkaŭaĵo oni povas kompreni lian labormanieron, kies plej karakteriza eco estas la fideleco, fideleco admirinda, preskaŭ mirakla, el laboro de la detaloj kun ekstreme delikata uzo de peniko. Sed ĉi tiujn detalojn potenca animo de granda viro plenigas per majesta enhavo, per pulsanta vivo; ĉi tiu fideleco jam ne impresas sole kiel honesta laboro de germana metiisto, sed kiel rezulto de naira admiro kaj pia respekto de granda homo al la naturo, kiel nobla peno de genio kiu volus kvazaŭ pristeli Dion por elerni de li la kreon kaj por rekrei la mondon per kraĵono kaj fizilo, sur papero kaj sur ligno.

Certe al ĉiu estas konata el liaj verkoj unu aŭ alia: la Kvar Apostoloj aŭ la Kavaliro, Diabolo kaj Morto, aŭ la ravanta Memportreto kaj certe ĉiuj vi konas liajn Kvar Rajdantojn de Apokalipso, kiujn li kreis en potenca inspiro kaj per frostremiga forto de fantazio.

Kvar centjaroj pasis kaj la Apokalipsaj Kvar Rajdantoj: la Milito, Pesto, Malsato kaj Morto dum tiu tempo nun la duan fojon rajdas luroze tra Eŭropo. Teruraj estas la suferoj kaj la mizero. Sed ili estas nur elementaj, se ni ne lasas droni en ili la animon de homo, la animon de nacio, la animon de la homaro. Ni devas levi la animojn, por konsoli kaj savu, al du majestaj kaj eternaj potencoj: al la Arto, far ĝi estas mem la Spirito kaj al la Amo, far ĝi estas Dio mem.

En la nomo de la Armeo de l' amo mi esprimas mian plej grandan respekton antaŭ unu el la plej grandaj filoj de la Spirito.


S-o Prof. Traugott Schulz de la Ĝermana Muzeo respondis al la solene parolitaĵ vortoj kaj dankis la ĉeestantaron pro la honorigo de l'majstro. La honorigo estus konsiderata kiel rekono de la alta kulturo germana. Prof. Ledermann tradukis la enhavon en Esperanto. Post aplaŭdego la muzika korpuso ludis la himnon Esperantan kaj la ovaciantarokantante disiris. Poste delegitaro de la kongreso estas akceptita de la urbestro s-o Luppe. Inter aliaj paroladoj okaze de tiu akcepto estas menciindaj tiu de la urbestro mem kaj la respondo de l' direktanto de la kongreso Prof. D-ro Dietterle, kiu en la nomo de la kongreso esprimis al s-o urbestro Luppe la dankon pro lia simpatio al nia afero.

Festprezentado de „Natan la Saĝulo“.

Hieraŭ vespere okazis en la Urba Teatro la unua prezentado de la fame konata drama teatraĵo de G. E. Lessing „Natan la Saĝulo“ en Esperanto. Neparolante pri la enhavo de la verko, nur menciante la belegajn scenejajn arangojn, mi konstatas, ke la prezentadoj estos senfina memoraĵo al ĉiuj gekongresanoj. La tuta geaktararo meritas grandan laŭdon pro la bonega prezentado. Ankaŭ tiu, eĉ esperantisto, kiu ĝis nun dubis pri la vivanteo lingva en tiaj prezentadoj povis konvinkigi pri la fakto, ke nia lingvo artefarita jam de longe fariĝis vivanta. Specialan laŭdon rilate al la prezentado meritas s-ro Alfred Richter-Anschütz kiel Natan, kvankam mi estus dezirinta karakterizon pli tipan de la ĉefa persono de l' teatraĵo. Bonege ludis kaj kaŭzis spontanegan aplaŭdon pro la laŭnatura ludado la prezentantino de Daja f-ino Klara Keller kaj ĉefe la ludanto de l'Monaĥejo s-ro Alexander Starke. Sed ankaŭ la alia kun-geaktararo estas plurfoje revokita post falo de l'kurteno.

Kiel lingva afero rigardite la prezentado estas same unika sukceso. La elparolo estis tiom klara, tiom komprenebla, tiom natura, ke oni efektive forĝesis la ĉeeston al ne-naclingva prezentado.

Esperanto pravis denove sian taŭgecon ankaŭ kiel lingvo de l'teatro. Malgrandaj mankoj negravaj rilate al disigo de sufiksoj — konstateblaj kelkfoje ĉe unu aŭ alia el la geaktoroj same, kelkaj evitindaj neologismoj en la teksto, neniel influas tiun konstaton. La bonega traduko de Karlo Minor, (L. K. kaj konata Esp. verkisto) sendube faciligis la prezentadon.



S-o Eroŝenko el Pekin
akompanata de japana samideano.

Pro tio je la fino de la prezentado la ĉeestantaro per krioj „Aŭtoro!“ aplaŭde dank-kvitancis. S-o v. Frenckell nome de la L. K. K. adresis kelkajn dankvortojn al la geaktararo. Mi firme kredas, ke en ĝi por eterne restos la memoro al tiu prezentado antaŭa forumo de naciaĵoj el proksimume 40 div. ŝtatoj. Florbuketoj kaj floroj estas donacitaj al la ludintararo.

R. Kr.

Malgrandaj komunikoj.

La vidvino de Leopold Einstein festas la 13. aŭg. la 80-an datrevenon de sia naskiĝotago. Nian koran gratulon!

Laŭ informo de L.K.K. por la Kongreso anoncis sin entute 4920 partoprenantoj; efektive ĉeestis preskaŭ 3200, inter kiuj multaj eksterlandanoj.

7-a Kongresa Numero de ET kun raporto pri la Ferma Kunsido kaj diversaj fakaj kunsidoj aperos la 19. aŭgusto.


Rezolucio de kursvidantoj.

En la faka kunsido por kursvidantoj (okazinta sabate la 4-an kaj lunde la 6-an) partoprenis ĉ. 100 personoj; estas akceptita jena rezolucio:

1. Ne faru rapidkursojn!
2. Ne faru kursojn sen pago!
3. Ne faru kursojn kun tro multaj partoprenantoj!
4. La kursvidanto devas esti kapabla por la kursvidado.
5. La kursvidanto konsideru ĉiam la individuajn kapablecojn de la kursanoj.
6. Koncerne la kursvidadon hodiaŭ oni ne povas fari komunan proponon, ĉar la demando estas tro delikata kaj tro vasta kaj devas esti ankaŭ prilaborata.
7. Laŭ propono de s-o Urban el Frankfurt oni elektis

1. komisionon, kiu sin okupos pri la problemoj organizaj,
2. komisionon, kiu sin okupos pri la problemoj metodikaj.

8. La kursgvidantaro akceptis la proponon de s-o Henriko Fischer revivigi la „Internacian Oficejon de Instruantoj“ fonditan dum la Kongreso en Dresden kiel kolekta centro kaj disdono de la spertoj faritaj de ĉiuj kursgvidantoj. La provizoran gvidadon de tiu ĉi oficejo havos s-ro Henriko Fischer.
9. Oni elektis por la supre menciita komisiono kaj la komisiono pri la organizaj aferoj s-on Emil Kreibich el Kladno (Bohemio), kaj s-on Max Urban el Frankfurt (Germanujo) por la komisiono pri metodikaj aferoj. Ĉiu el tiuj du sinjoroj elektos duan kunlaboranton, kies nomojn ili komunikos al la Internacia Oficejo de Instruantoj kaj per la gazeto al la aliaj kursgvidantoj. Tiuj ĉi kunhelpantoj devas aparteni al nacio ankoraŭ ne reprezentata en la komisiono. E. Kr.



Momenta bildo de la Kongresejo.

FAKKUNSIDO

de la Internacia Ligo de Esp. Postoficistoj (Ilepo), 3. aŭgusto poŝtagmeze.

Ĉeestas 53 gepoŝtistoj el jenaj landoj: Germanujo, Aŭstrio, Hispanujo, Estonio, Finlando, Ĉeĥoslovakio, Saarteritorio. La Superaj Poŝtdirektoj en Nürnberg kaj Augsburg sendis kiel oficialajn reprezentantojn s-ojn Superajn Registarkonsilistojn Huss kaj Zerzog kaj s-on Poŝtinspektoron Bolkart.

La prezidanto, s-o Supera Registarkonsilisto Otto Reber, Bamberg, malfermas la kunsidon, salutas la oficialajn reprezentantojn kaj la partoprenantajn kaj dankas la Superajn Poŝtdirektojn Nürnberg pro la bona funkciado de la poŝtsendado per speciala poŝtoficejo en la Kongresejo kaj la Superajn Poŝtdirektojn Augsburg pro la fava distriktdonado, per kiu ĝi rekomendis la ĉeestadon en nia 6-a kunveno al ĉiuj Esp. gepoŝtistoj. S-o Huss salutas la Konferencon flanke de la Superaj Poŝtdirektoj, esprimas ilian simpatian por nia movado kaj deziras al ni bonegan sukceson.

Saluttelegramon sendis s-o Poŝtinspektoro Michelis di Rienzi, unua vicprez. de Ilepo. Estas rimarkinde ke la telegrafo transdonis la telegramon en Esp.

Laŭ la interesaj raportoj el la diversaj landoj nia movado inter la gepoŝtistoj bone progresas. La verkado de fakvorfaroj kaj la traduko de la Internacio Poŝtkonvencio estos baldaŭ pretaj. La de s-o D-ro Ed. Spielmann, Poŝtinspektoro en Bern, dua vicprez. de Ilepo, verkita: „Resumo el la plej interesaj datoj de la Posta Historio“ estos baldaŭ presata.

Diversaj proponoj estas alsenditaj al la prez. en la pasinta jaro, i. a.: akcepto de Esp. por telegramoj, eldono de la oficiala fakrevuo „L' Union Postale Universelle“ en Esp., Esp. signoj apud la ĝicetoj, kie deoras Esp. oficistoj. La ĝisnuna estraro estas unuanime reelektata.

Nia fakrevuo restos „La Poŝtisto“, kiu aperas kiel aldono ol „La Policisto“, abonebla ĉe s-o Aŭgusto Marich, P. Hung. Reĝa Polica Ĉefinspektoro, Budapest IX, Ulloi-ut. 59-IV-8.

Estis preparataj petkriboj al la Internacia Posta kaj Telegrafa Unuiĝoj kun aldono de la nombro de la necesaj subskriboj por enkonduko de Esp. en internaciaj rilatoj poŝtaj kaj telegrafaj kaj por akcepto de Esp. kiel „malsekreta (klara) lingvo“ en la telegrafado. La kunsido akceptas ĉi-tiurilatan rezolucion, kiu estos prezentata por akcepto al la tria labor-kunsido de la XV-a Universala Kongreso. Ni petas, multnombro kolekti subskribojn por la petkribo kaj sendi ilin plej malfrue ĝis januaro 1924 al s-o D-ro Ed. Spielmann, vicprezidanto de Ilepo, P. K. 174, Transito, Bern (Svisujo). Ĉe la sama s-o estas haveblaj subskriblistoj. Thoma, sekretario.

Bonvolu represigi en naciaj fakrevuoj!

Fakkunsidoj de la saksa instruistaro.
(Du kunsidoj je 3. kaj 6. aŭgusto.)

La prezidanto, s-o Scheibler, salutas la multnombrajn (55) ĉeestantojn. La tagordo estas akceptita.

1. Statistikio. Nuntempe estas en Saksujo 429 geinstruistoj en 125 lokoj, kiuj kapablas instrui Esperanton. La statistika laboro estas tre grava, ĉar ĝi helpas al ni en la registara ministerio. Oni decidis, ankoraŭ resti membro de la saksa geinstruista unuiĝo (Sächsischer Lehrerverein).

2. Kotizoj. Laŭ la decido de la germ. instruistaro la kvaronjara kotizaĵo estas 4000 markoj. Por havigo de manpresaparato „Greif“ oni decidis liberalan kotizadon po membro almenaŭ 10000 gmk.

3. Traduka tasko. La prezidanto proponas 1. Kawerau, Sinoptika tabelo, 2. Klemm, kulturinstruado. Oni elektas la tre gravan libron de Klemm (Dresden), kiu havas valoron por la tuta mondo, por instruistoj, gepatroj kaj lernantoj.

4. Aliaj aferoj. La venonta ĉefkunveno de la saksa instruistaro estos versajne okaze de la Germ. Esp. Kongreso en Plauen. La prezidanto petas

akcepton de dankskribaĵo al la seminario de Auerbach, kies lernantoj tiel brave plibeligis la diservon en Sebald a preĝejo. Li ankaŭ sendis protestskribaĵojn al la ministerio en Berlin, ke oni malpermesis la envojaĝon de la belgaj kaj francaj kolegoj. Preĉipian dankon li diras fine al la L.K.K. O. M.

Framasona kunveno.

Al la faka kunsido de la framasonoj ĉeestis membroj el diversaj landoj. Post ekzameno la ĝenerala sekretario, s-o Barthel faris detalan raporton pri la agemo de la Universala Framasona Ligo. Laŭ lia propono oni elektis delegitaron por la diversaj landoj kaj ankaŭ novan estraron. Oni fiksas la kotizon je 2 svis. fk. jare. Post memoro al la mortintaj membroj precipe al Kolonelo Pollen, Vezezy Strong, Alf. Fried, la Nobel-premitulo kaj aliaj eminentaj membroj de la ligo, oni decidis kiel oficialajn organaĵojn la „Bulletin“, aperantan en Genève kaj ET. Oni plue decidis prezenti denove Esperanton kiel kongreslingvon al la Internacia Fram. Konvento en Genève en la proksima monato kaj precipe al la Granda Konvento en Bruxelles dum 1924. La vicprezidanto de la ligo dankis al la sekretario por lia nelacigebla agemo, kaj per belega poemo finiĝis la ne tre ampleksa, sed interesplena kunveno.

Raporto pri la fakkunsidoj de la liberpensuloj kaj monistoj.

Ĉeestis 61 personoj el diversaj landoj. S-o D-ro Teilhaber advokato de München estis elektata kiel prezidanto. S-o Hubricht, la fondinto de la liberpensulmovado inter la Esperantistaro raportis pri la movado, kiu iom post iom disvastiĝantas. Jura konsilisto de la urbo D-ro Heimerich salutis la Esperantist. liberpensularon nome de la Bavara Liberreligia Ligo kaj deziris bonan sukceson.

Kiel estraro de la Internacia Ligo de Liberpensuloj por 1923 estis elektata: 1. prez. s-o Everts, Amsterdam (Nederl.); 2. prez. s-o Weigel, Bodenbach (Ĉeĥosl.); sek. s-o Hubricht, Leipzig (Germ.); kunsidanto kaj revizianto s-o Bartzsch, Leipzig (Germ.); diversaj landreprezentantoj.

Post vigla diskuto pri la disvolviĝo de la movado la fakkunsido decidis, ke la sekretario per helpo de la naciaj reprezentantoj kolektu la leĝojn pri religia instruo en la lernejoj. Bartzsch, prot.

Por gesamideanoj el Finlando, Latvio, Litovio, Svedujo kaj Danzig.

Tiuj kongresanoj kiuj, reveturante hejmen, travojaĝos Stettin kaj tie restados kelkan tempon, estas petataj baldaŭ sendi al mi sciigon pri dato de alveno, pri deziroj rilate al loĝado ktp. La Stettinaj gesamideanoj havas la vigan deziron pasigi kelkajn horojn kune kun ili. Dum la kongreso, oni ankaŭ havas okazon sin anonci ĉe mi buŝe.

K R I E G E R

Stettin, Klosterhof 23

prezidanto de la Esperanto-Verein Stettin.

KOREKTO.

XV-an Kongreson salutis je la nomo de ministro de publika instruado de Litovujo ne s-o Ruokis, sed inspektoro de lernejoj de Litova Respubliko A. Opulskis.

Antaŭmendu la humorplenan libron

Maks kaj Moric de Busch

la fama germana humorista poeto kaj genia ilustristo en Esperanto!

Braun & Schneider, München I

Eldonejo de „Fliegende Blätter“.

Ni serĉas Kunlaborantojn en

la tuta mondo

Korespondo en germana aŭ Esperanta lingvoj.

Spar- u. Credit-Aktiengesellschaft

Geschäftsstelle Berlin S. W. 47.

Ĝus aperis granda serioza Esperanta Libro

„Litova Almanako“

kio estas senpage donata al ĉiuj abonantoj de „Litova Stelo“. Abonoj estas akceptataj en

Kongresa Akceptejo.

Listo de la aliĝintoj laŭ nacioj

ĝis n-o 4500.

Anglujo	165	Rumanujo	72
Aŭstrio	332	Ruslando	35
Belujo	11	Svedujo	41
Bulgarujo	75	Svislando	37
Ĉeĥoslovakio	412	Turkujo	1
Danujo	22	Ukrainio	1
Danzig	9		
Estonio	58	Ekstereŭropaj:	
Finlando	59	Usono	1
Francujo	29	Egiptujo	7
Germanujo	2596	Argentinio	3
Hispanujo	46	Aŭstralio	2
Hungarujo	167	Brazilo	—
Italujo	47	Hinujo	1
Jugoslavio	52	Hindujo	1
Latvio	21	Japanujo	2
Nederlando	48	Javao	1
Norvegujo	2	Kanado	1
Polujo	192	Meksiko	1

Blinduloj.

Dum la veturado al Rothenburg estas kolektitaj por la blinduloj kaj transdonitaj al ili gmk. 1.792.721

Dankon al la donacintoj!

RUĜA KRUCO.

Kiel estis anoncita sur la programo de la Kongreso, okazis faka kunveno de la Esperantistaj Ruĝkrucaĵoj. Estris s-o D-ro G. Halmágyi (Hungarujo), kiun la ĉeestantoj elektis kiel prezidanton. Ĉeestis pli granda nombro da anoj kaj amikoj ol en la lasta jaro en Helsingfors. La kunsido estis honorata de s-ino Zamenhof, kiu ĉiam montras intereson je tiu grava movado. S-o R. Horner, oficiana delegito de la Internacia Komitato de Genève, prezentis plenan raporton pri la rezulto de la decidoj de la lasta Kongreso en Helsingfors kaj pri la nuna stato de la laboro de la Ruĝa Kruco en diversaj landoj. Post vigla diskutado oni akceptis aron da rezolucioj, el kiuj ni eliras por la legantoj de „Esperanto Triumfonta“ la jenajn:

3. La Esperantistaj Ruĝkrucaĵoj kaj geamikoj de tiu movado deziras danki al la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco pro la malfermo de ĝia oficiala organo al Esperantaj informoj kun reciproko de la Esperantaj ĵurnaloj.

4. la Esperantistoj dece kaj urĝe petas la Internacian Komitaton, zorge ekzameni, en kiu maniero oni povus a) konservi la noblan spiriton montritan dum la milito, b) inspiri kaj vigligi nuntempe la lokajn grupojn, c) doni al la naciaj kaj lokaj grupoj laboron, kiu ne nur havas naciun, sed ankaŭ internacian celon.

5. La Esperantistaj Ruĝkrucaĵoj kaj amikoj promesas sian helpon al la Internacia Komitato, sed ili bezonas por tiu ĉi celo propagandilojn kaj de tempo al tempo informojn pri la paca laboro de la Ruĝa Kruco en la tuta mondo.

La anoj de la fakkunveno unuanime aprobis la proponon de s-o Neuzil (Ĉeĥoslovakio) krei konstantan Esperantan komitaton por la aferoj de la Ruĝa Kruco. Oni elektis provizore s-on D-ro G. Halmágyi (Hungarujo) kiel prezidanton kaj i-inon A. Nicol (Skotlando) kiel sekretariinon.

Favoraĵoj por kongresanoj en Ĉeĥoslovakio.

Laŭ decido de la ĉeĥosl. registaro ricevos ĉiuj kongresanoj neĥeĥoslovakiaj volantaj post la kongreso viziti Ĉeĥoslovakion 50% rabaton je vizo ĉe la konsulejoj kaj 33% rabaton je fervojoŭprezo el Eger kaj el Praha. Por ricevi la rabaton, estas necese montri la kongresan legitimacion kaj vojaĝi en karavaneto (almenaŭ 4 kune). Informojn detalajn donas ĝen. sekretario de ČAE s-o Hromada aŭ aliaj komitatanoj.

Foiro de Reichenberg

Ĉeĥoslovakio okazos tuj post la kongreso de la 11.-19. aŭgusto 1923.

Rapida kaj agrabla vojaĝo de Nürnberg-Dresden-Zittau al Reichenberg aŭ de Nürnberg-Eger-Karlsbad al Reichenberg. Foiraj legitimacioj haveblaj ĉe **SCHENKER & Co., Sandstrasse 24,** per kiu la foirvizitintoj ricevos 75% rabaton al la vizitakso, el bonvalutaj landoj 25%. Esperantistoj akceptos kaj gvidos la kongresanojn.